

32a jarkolekto - februaro 2011/02

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

Albanio:
partio kverelas,
popolo suferas

Okcitanio:
„Ni konservos
la afiŝojn!”

Ĉinio:
junaj virinoj for de la amo

Edwin de Kock

Sub Fremdaj Ĉieloĵ

“Nekutime leginda verko”

Donald Broadribb



Ne nur poezio estas en la libro ... enestas, kompreneble, liaj “Lastaj poemoj” sed ne malmultaj scios ke post tiuj “lastaj” li jam verkis sufiĉe multe da postlastaj, kaj iuj el inter tiuj ankaŭ estas troveblaj en tiu ĉi honora kompilaĵo. Tre legindaj estas i.a. nepre la eseoj pri la historio de Esperanto en Sud-Afriko, pri la memorindaj personoj kiujn Edwin renkontis en kaj ekster la verda mondo.

Sed... prefere malkovru mem!

Paĝoj: 288; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 32

Pezo: 333 g

ISBN: 978-90-77066-33-1

Prezo ĉe FEL: 22,50 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rele: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

„Ni konservos la afiŝojn!”



Milo da homoj – laŭ organizantoj – manifestaciis en decembro en Vilanòva de Magalona (Okcitanio), post kiam kortumo en Monpeliero verdiktis demeti okcitanlingvajn afiŝojn, kiuj anoncis la urbon al veturantoj.

Floras „enklavo” komunista



La vilaĝo Nanjie troviĝas en Linying, Henan-provinco, meza Ĉinio, kaj okupas 1,78 kvadratajn kilometrojn. Enirante la vilaĝon, oni kvazaŭ revenas al la periodo de la tiel nomata Kultura Revolucio, kiu furiozis dek jarojn en la tuta lando.

Kipro eksportas, Ĉinio importas

18

Kion eksportas la malgranda Kipro al la mondo? Jam delonge forpasis la tempo, en kiu la lando fosis kaj eksportis kupron, metalon kies nomo signifas ĝuste „kiprodevena”. Pro la sama kialo cetere la insulo aperas kuprokolora centre de la propra flago. Tamen, ankaŭ la nuntempa Kipro havas kelkajn produktojn por eksporti.

FOTO DE LA KOBRILO: RELATO AT MAIN CHINA

politiko

DIPLOMATIO	8
Eksportitaj: armiloj kaj malamikeco	
KOSOVO	8
Aspiroj, espero	
BALKANIO	9
Ŝtato plej izolita	
ALBANIO	9
Partio kverelas, popolo suferas	
OKCITANIO	10
„Ni konservos la afiŝojn!”	

moderna vivo

MEDIOPROTEKTADO	11
Ekonomio ekologia	
OPINIO	12
Tunelo anstataŭ ĥaoso aŭ ĉu nur ĥaoso?	
ĈINIO	14
Floras „enklavo” komunista	
ĈINIO	17
Junaj virinoj for de la amo	
KOSOVO	17
Plibonigoj	

ekonomio

KURACILOJ	18
Kipro eksportas, Ĉinio importas	

lingvo

Estis iam alfabeto ...	19
------------------------	----

spirita vivo

HISPANIO	21
Santiago Florbuĉanto	
NEDERLANDO	22
Islama universitato rekonita	

turismo

LITOVIO	23
Muzeo plena je humuro	

libroj

Senmita biografio de Zamenhof.....	24
Admirinda historilibro.....	25

> Abonoj.....	4
> Enkonduko.....	5
> Leteroj.....	6
> El mia vidpunkto.....	7
> Anoncetoj.....	27

► Rekto al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al rebutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	25	28	15	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	67
Estonio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Greĥio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hispanio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Hungario	HUF	8100	8900	4860	1530	2500
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Latvio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Litovio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	25	28	15	5,5	9
Slovakio	EUR	29	32	17,4	5,5	9
Slovenio	EUR	39	42	23,4	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazilia:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: cab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Podĉbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerĉni banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofcejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schweringer, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzler@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,

- 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalininograd, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćiriĉ, Branka Miljkoviĉa 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeric@eunet.rs.
 - > **Slovaka:** Stano Marĉek, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: marcek@esperanto.sk.
- > **Slovenaj:**
 - > Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: viŝnja.brancovic@os.tnnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schledrom 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Novaj kunlaborantoj

En la pasinta numero Stefan Maul informis vin pri lia retiriĝo kiel ĉefredaktoro de MONATO kaj Paul Gubbins prezentis sin al vi. Sed la ŝanĝo de ĉefredaktoro ne estas la sola novaĵo, kiu efektiviĝis ekde januaro ĉi-jara. Ni ankaŭ havas nun novan redaktoron pri la rubriko „Lingvo”. Juna lingvisto Andreo Peetermans ekde nun transprenas la taskon de la multjara kunlaboranto Yamasaki Seikō.

Andreo Peetermans evidente estas lingvemulo. Li naskiĝis en 1990 kaj denaske estas parolanto de la nederlanda. Dum sia lerneja periodo li edukiĝis precipe pri la lingvoj franca, angla, latina kaj pragreka. Li eklernis Esperanton en 2005 kaj unuafoje ĉeestis Esperanto-kongreson en la somero de 2008 (UK de Roterdamo). Nun li estas studento pri lingvistiko

kaj literaturo, specialiĝanta pri la latinaj kaj italaj lingvoj kaj literaturoj. Andreo disponas pri utila pasiva rego de la hispana kaj portugala, kaj frekventas ekde tiu ĉi monato universitatan kurson pri la hindia. Sian konon pri Esperanto kaj pri lingvistikaj temoj li jam plurfoje pruvis, interalie en diskutoj en la paĝoj de *www.ipernity.com* kaj kiel recenzanto de prilingva libro en nia magazino.

La tuta skipo de MONATO deziras al la nova redaktoro multe da entuziasmo en la plenumo de lia tasko! Samtempe ĝi prezentas al kolego Yamasaki Seikō tre sinceran dankon pro la gvidado de la rubriko „Lingvo” dum la pasintaj 16 jaroj!

Sincere via



Paŭl Peeraerts



Andreo Peetermans, la nova redaktoro de la rubriko Lingvoj.



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represo kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: Flandra Esperanto-Ligo
- Iperity: http://flandra_esperanto-ligo.ipernity.com

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

revizianto:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio.

Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
 - **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
 - **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
 - **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
 - **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.
- Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprincipiate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Hesit-op-den-Berg. Rete: lingvo@monato.net
 - **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.
 - **Moderna vivo:** Paul Gubbins,

3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Obama silente aprobas

Vi eble jam bone konas mian favoron, eĉ entuziasman simpatian al Obama. Mi tolereme akceptis liajn diskutindajn kompromisajn cedejn al la „ŝtat-intereso” koncerne al Gvantanamo, iraka kaj afgana militoj, bankistaj kanajlaĵoj, sanitara servo, petrol-esploroj kaj similaj, ĉiam pensante „nu, li devas adaptiĝi al la majoritata pensmaniero de la usonanoj.” Nu, pli bone akcepti etan malbonon, ol pli grandan malfeliĉon ...

Sed ĉio havas limon. Nun ni ŝokite legas, ke lia ministro pri eksterlandaj aferoj Clinton asertas, ke Berlusconi – la nuna okcidenta Bokasa – estas „multevalora, nemalhavebla amikaliancano de Usono”. Kaj Obama ... silentas, do aprobas.

Ne, tion ni ne povas akcepti! Jam en la 30aj jaroj Churchill, pro „ŝtat-intereso”, proklamis Mussolini „granda nemalhavebla ŝtatisto”, pro tio, ke li stabiligis la eŭropan situacion, haltigante la komunistan komploton.

Kaj nun li, ĝuste li, Obama, elektita pro la entuziasma favoro de homamasoj strebantaj al almenaŭ iom da socia justeco – fakte aprobas, laŭdas, akceptas – pere de sia ministro pri eksterlandaj aferoj – la fiegan agadon de malestiminda mafiano – simila al la itala Al Capone – pro tio, ke li stabiligas la eŭropan situacion, evitante finanĉan katastrofon! Kaj li kovarde silentas! NE! Tio estas nekomprenebla, neparadonebla!

Ni, sanmensaj italoj, suferegas pro la krima agado de Berlusconi, tiu narcisisma seksmania ŝakristo, kiu minacas renversi nian liberalan konstitucion kaj starigi sud-amerikeskan banandiktaturon, por senĝene daŭrigi siajn „sovaĝajn noktajn orgiojn” (laŭ priskribo de usona ambasadoro) ... Kaj li, Obama, nia heroo, nia ideala ŝtatisto, aprobas, laŭdas, dankas tian kanajlon! Kion alian esperi? Kion alian kredi? Se tia estas la realo: nenia espero por la homaro!

Ŝokite, indigne, triste.

Sen RODIN
Italia

Gratulon kaj dankon

La informo, ke Stefan Maul, nia konata kaj aminda ĉefredaktoro, rezignis pri sia funkcio, certe ne ĝojigis min, sed la fakto pri posteulo taŭga kaj multvalora kuraĝigas min ege. Paul Gubbins estas multifaceta persono, ne nur modesta, klera kaj komunikigema, sed ankaŭ tre kvalita en la ĵurnalisma kampo. Mi gratulas kaj dankas elkore amikon Stefan pro lia notinda kontribuo al la revuo, esperante ke liaj sugestoj kaj konsiloj ne mankos, same kiel liaj artikoloj. La novan ĉefredaktoron, amikon Paul Gubbins, mi bonvenigas, kaj cetere mi ege dankas lin pro lia granda helpo ankaŭ al mi kiel kunlaboranto.

Bardhyl SELIMI
Albanio

Gratulojn al Yves Nicolas

Gratulon kaj dankon al Yves Nicolas pro lia inteligenta analizo de la francaj protestoj kontraŭ la prokrasto de la emeritiĝa jaro de 60 ĝis 62 (MONATO 2010/12, p. 14-15). Estis facile por eksterulo iom malestimi tiujn protestojn, ĉar, kiel Nicolas mem diras, la ŝanĝo estas fundamente prava decido. Nicolas multe helpis min kompreni la verajn, legitimajn bazojn de la protestoj. Gratulon kaj dankon ankaŭ al MONATO, kiu per tiaj artikoloj ebligas komprenon de alilandaj eventoj, komprenon, kiun mi ne akiris pere de usonaj kaj eŭropaj ĵurnaloj.

Bruce SHERWOOD
Usono

Gratulojn al Yves Nicolas (2)

Mi volas gratuli ĉiujn pro la interesa enhavo, vere mult-devena (ne nur eŭrop-devena!), de la decembra numero de MONATO. Krome, mi plene konsentas kun Yves Nicolas pri lia analizo koncerne la ok amasajn surstratajn manifestaciojn en Francio kontraŭ la projekto – nun leĝo – pri la reformo de la emeritiĝosistemo. De pli ol dek jaroj kreskas la maldungado, pliriĉigas la riĉuloj kaj la sinsekvaj registaroj malmuntas, unu post la alia, la sociajn akiraĵojn. La francaj civitanoj ne rezignis; tion ekkonscios Sarkozy almenaŭ en 2012, okaze de la prezidanta balotado!

Pierre GROLLEMUND
Francio



La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado.

Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la retaj versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Kompatinda Eŭropo

Paul GUBBINS

Elektoj – aŭ, verdire, ŝajnelektoj – en decembro en Belorusio fermis mizeran jaron por Eŭropa Unio. Aserto unuavide aŭdaca, se ne ridinda, ĉar Belorusio ne membras en EU. Kiamaniere, do, aferoj en tiu ĉi eks-sovetia respubliko, kiu sendependiĝis en 1991, rilatas tiel senesperige al EU?

Temas, kiel ofte en la nuna mondo, pri mono. Rusio, ŝajne, perdis intereson pri sia iama satelito. La prezidento de Belorusio, Aleksander Lukaŝenko, fariĝis, en la okuloj almenaŭ de televida kompanio posedata de la potenca rusa gaskompanio Gazprom, korupta mafiano.

Jen do ŝanco por Bruselo. Al la belorusa ĉefurbo Minsko flugis la ministroj pri eksterlandaj aferoj de Germanio kaj de Pollando. Ili alportas al Lukaŝenko sukan proponon. Se vi, ili informas la prezidenton, okazigos en



La prezidento de Belorusio, Aleksander Lukaŝenko.

via lando elektojn liberajn kaj justajn, EU pretos finance helpi per subvencioj kaj pruntaĵoj kun valoro de tri miliardoj da eŭroj.

Nafto

Kaj kio okazis? Dek tagojn antaŭ la elektoj Lukaŝenko, intertraktinte denove kun sia nord-orienta najbaro, Rusio, konsentis akiri je rabatita prezo nafton, kiun ĝi povos profite plu vendi je altigita kosto. Samtempe Belorusio fariĝis membro de tiel nomata unuopa areo ekonomia kun Rusio kaj Kazahio.

Bone. Kontraste al militoj aŭ malsatoj, terorismo aŭ tertremoj, la ĉeesto en la mondo de unu plia diktatoro – kiu tuj post la elektoj arestigis kaj enprizonigis opoziciajn kandidatojn kaj subtenantojn – ne multe gravas. Tamen la fakto, ke malriĉa ŝtato, kun landlimo kun EU (kun ankaŭ Rusio), tamen rifuzas la proponon de relative stabila, relative demokratia, relative malferma najbaro, nepre pensigas. Ĉu la eŭropa revolo iom post iom fariĝas elreviĝo?

Ne malfacilas tiel argumenti. Embarase fuŝita diplomatio rilate Belorusion estas unu afero; problemoj frontantaj al eŭropaj ekonomioj, kaj aparte ties komuna valuto, la eŭro, tute aliaj. Jam en la pasinta jaro ŝanceliĝis ekonomioj en Grekio kaj Irlando; minacataj restas tiuj en Hispanio kaj Portugalio.

Eŭro-eksperimento

Denove aŭdiĝas la voĉoj de tiuj, kiuj pledas por dunivela Eŭropo: la plej fortaj landoj uzu la eŭron, dum aliaj aŭ retenu siajn forintojn aŭ zlo-tojn aŭ eĉ revenu al siaj pesetoj aŭ draĥmoj. Eĉ en Germanio, la eŭropa

„bankisto“-ekonomio, estas tiuj, kiuj volas rezigni entute pri la eŭro-eksperimento, kaj readopti sian amatan – siatempe sukcesan kaj stabilan – germanan markon.

Dume, danke al la tiel nomataj viki-likoj, oni scias, kion opinias usonaj diplomatoj pri eŭropaj ŝtatestroj. La verdiktoj ne flatas. La germana kanceliero, Angela Merkel, evitas riskojn; la franca prezidento, Nicolas Sarkozy, estas maldikhaŭta kaj aŭtoritata; la itala prezidento, Silvio Berlusconi, estas vanta kaj tute netaŭga kiel moderna ŝtatestro. Nenio pozitiva, nenio esperiga (ĉu necesis viki-likoj, parenteze, por lerni, kio pri la triopo jam delonge evidentas?): tamen en ties manoj kuŝas estanteco kaj estonteco de EU.

Sekureco

Kompatinda Eŭropo. Tutcerte la unio alportis al pluraj landoj, al milioj da homoj, demokration, sekurecon kaj prosperon. En tiu senco ĝi mirinde sukcesis – eĉ pli, verŝajne, ol povis imagi en la 1950aj jaroj ties „patroj“, Robert Schuman kaj Jean Monnet.

Tamen jukas herezo, ke la unio en la lastaj jaroj tro haste, pelmele, senritme kreskis. Ĉu ne pli saĝe resti ĉe 12 aŭ 15 ŝtatoj, kun relative similaj, relative samevoluintaj ekonomioj, por ekkrei vere komunajn, demokratiajn kaj efikajn instituciojn politikajn, financajn kaj sociajn? Alivorte pli profundan, ol pli larĝan, komunumon?

Klare: ne en unu tago elkreskis Kartago. Kaj ne en 60 jaroj elkreskis Eŭropo. Tamen estus bedaŭrinde, se Eŭropo jam atingis siajn limojn – ĉu fizikajn, ĉu metaforajn – tiel ke unu el la plej ambiciaj, kaj pacaj, internaciaj projektoj post la dua mondomilito kolapsos pro pezo de ekonomiaj kaj aliaj – ekzemple ŝovinismaj – premoj.

Eksportitaj: armiloj kaj malamikeco

Armiloj trovitaj en pli ol 20 konteneroj en haveno en Lagoso, la komerca ĉefurbo de Niĝerio, endanĝerigas la rilatojn inter Niĝerio kaj Irano. Antaŭe la du ŝtatoj ĝuis amikajn rilatojn, sed nun regas situacio diplomatie malfacila.

Sekurecaj agentoj kaj doganistoj tuj informis la federacian registaron pri la armiloj. Plia enketo kaj esplorado malkovris, ke la konteneroj devenas el Irano, kaj ke la armiloj celas Mez-Orienton. Sekvis diplomaciaj kontaktoj kaj intervenoj.

Ministro

La niĝeria registaro, pere de la ministro pri eksterlandaj aferoj, Ajein Aju-mogobia, kontaktis la iranajn registaron kaj raportis la aferon al la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj.

Por eviti damaĝon al la rilatoj inter Irano kaj Niĝerio, la irana registaro permesis al niĝeriaj sekurecaj agentoj eniri sian ambasadorejon por intervjui funkciulojn. Tiel oni malkovris, ke oficisto ĉe la irana ambasado en Abuja aranĝis la transportadon de la armiloj. La kul-

panto estis tuj transdonita al la niĝeria sekureca servo.

Ligoj

Irano tuj revokis sian ambasadoron kaj petis pardonon. Tamen aliaj afrikaj registaroj kondamnis Iranon. Ekzemple Gambio, kiu havas intiman rilaton kun Niĝerio, nuligis siajn diplomaciajn ligojn kun Irano kaj ordonis al siaj reprezentantoj tuj forlasi la landon.

Kelkajn semajnojn poste oni denove malkovris en Lagoso konteneron el Irano, ĉi-foje enhavantan 130 kg da heroino kaŝita inter aŭto-partoj. Denove esploris niĝeriaj agentoj, kiuj arestis la kulpan-ton. Sendube tiu ĉi lasta malkovro ne helpos restarigi la rilatojn inter Irano kaj Niĝerio.

Princo Henriko OGUINYE/pg



La aŭtoro, Bardhyl Selimi, voĉdonas en la eksterordinaraj balotoj en Kosovo.

KOSOVO

Aspiroj, esperoj

En decembro en Kosovo okazis eksterordinaraj balotoj. Ili necesis post la ekŝigo de ĉiuj ministroj de la koalicia partio *Demokratia Ligo de Kosovo* (LDK).

En la balotoj venkis la *Demokratia Partio de Kosovo* (PDK), estrata de Hashim Thaçi [haŝim taĉi], kun pli ol 33 % de la voĉoj. Sekvis la *Demokratia Ligo de Kosovo*, estrata de Isa Mustafa, kun pli ol 23,5 % kaj la nova partio *Memdecido*, estrata de Albin Kurti.

Debato

Oni atendis pli viglan debaton, ĉar antaŭe regis la unuaj du grandaj partioj kontraŭ sufiĉe malgranda partio, la *Alianco por la Estonta Kosovo* (AAK). Ĝin estris Ramush Haradinaj, juĝata en Hago pro militkrimoj.

Ĉiuj partioj aspiris, ke Kosovo baldaŭ aliĝos al Eŭropa Unio kaj al Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo. *Memdecido*, krome, aspiris pri baldaŭna unuiĝo de Kosovo kaj Albanio kaj samtempe pri malpli da internacia interveno (tamen restu NATO-trupoj).

Oni ankoraŭ ne scias, kia estos la nova koalicio necesa por nova registaro. Tamen ĉiuj esperas, ke ĝi antaŭenpuŝos la klopodojn por pli prospera, demokratia kaj sendependa Kosovo.

Bardhyl SELIMI

BALKANIO

Ŝtato plej izolita



MONDRIJNE

Antaŭ nelonge la civitanoj de Albanio kaj de Bosnio kaj Hercegovino akiris la rajton libere moviĝi tra la tiel nomataj Ŝengen-landoj de Eŭropo. Senrajta tiel restas nur Kosovo.

Kial? Ĉu ties civitanoj ne eŭropemas (en Gallup-enketo en 2009 pli ol 88 % de kosovanoj respondis „jes” al Eŭropo)? Ĉu en Kosovo ne agadas eŭropaj organizaĵoj, inkluzive de 10 000 soldatoj de KFOR kaj 2500 juĝistoj kaj policistoj de EULEX, eŭropa misio por starigi leĝaron? Ĉu en Kosovo ne cirkulas eŭro?

Jugoslavio

Antaŭ 20 jaroj la civitanoj de Kosovo, kadre de eksa Jugoslavio, rajtis libere vojaĝi tra Eŭropo kaj eĉ tie loĝi kaj labori. Tamen nun tiu ĉi plej nova ŝtato estas la plej izolita en la mondo. Ĝiaj civitanoj rajtas senvize moviĝi al nur kvar ŝtatoj: Albanio, Makedonio, Montenegro kaj Turkio. Kontraste, afganoj rajtas senvize moviĝi al 22 ŝtatoj, irakanoj al 23 kaj somalianoj al 24.

Eĉ bosnianoj loĝantaj en Kosovo ne

rajtas per siaj pasportoj eniri Bosnion, kiu kiel Serbio ne rekonas ties pasportojn. Serboj loĝantaj en Kosovo iru al Beogrado por akiri serban biometrikan pasporton markitan per litero „K” por distingi ilin de „veraj” serboj.

Vizokotizo

Nur du el tri vizopetoj ĉe la malmultaj fremdlandaj konsulejoj en Prištino estas akceptitaj. Plue, ŝajne nur en Kosovo okaze de akcepto konsulejoj notas sur la pasporto per minuso apartajn Ŝengen-landojn, kiujn la vizoposedanto tamen ne rajtas eniri. Cetere la vizokotizo estas pli alta ol alilande, ĉirkaŭ 120 eŭroj.

En Kosovo loĝas ĉirkaŭ du milionoj da homoj, dum en balkanaj landoj orientaj kaj okcidentaj nun povas libere moviĝi ĉirkaŭ 50 milionoj. Kial Eŭropo timas? Kial ĝi ankoraŭ konsideras ĝin „nigra truo”, dum krimado kaj aliaj malagrablaĵoj tie malpli oftas (laŭ Gallup) ol en aliaj regionoj de la malnova kontinento? Certe Kosovo meritas egalan pritraktadon.

Bardhyl SELIMI

ALBANIO

Partio kverelas, popolo suferas

La usona ambasadejo en la albania ĉefurbo Tirano ne pagos promesitan monsumon al la registaro, se la reganta politika partio ne ek esploros la rezultojn de la pasintjaraj landaj balotoj. Pro tio, siavice, la opozicio rifuzas aprobi reform-leĝojn. Rezulte Usono ne emas pagi la monon promesitan kadre de la fonduso por la jarmilo, kiu helpas subevoluintajn landojn.

La koncerna sumo celas la konstruon de administra juĝejo sed, dum forestas interkonsento inter la partioj, la mono ne estos pagita. Tiama maniere partioj kverelas, sed la popolo suferas.

Bardhyl SELIMI



JUSTIN SLOANE

Artikolojn pri la politiko en via regiono sendu al politiko@monato.net.

OKCITANIO

„Ni konservos la afiŝojn!”

Milo da homoj – laŭ organizantoj – manifestaciis en decembro en Vilanòva de Magalona (Okcitanio), post kiam kortumo en Monpeliero verdiktis demeti okcitanlingvajn afiŝojn, kiuj anoncis la urbon al veturantoj.

Politikistoj lokaj, regionaj kaj eŭropaj, kaj reprezentantoj de kulturaj organizaĵoj de la tuta Okcitanio, kunvokitaj de la federacio de okcitanlingvaj lernejoj *Calandreta*, subtenis la urbestron Noël Segura, kiu decidis malobei la kortuman verdikton. Segura asertis, ke li apelacios kaj faros ĉion ajn, sed neial demetos la okcitanlingvajn afiŝojn.

Katalune

Manifestaciantoj koncentriĝis antaŭ la urbodomo, sur kies balkono elstaris kopio de la afiŝoj malpermesitaj de la franca justico. Diversaj urbestroj kaj aliaj elektitaj politikistoj parolis france kaj okcitan. Tiuj de la katalunlingva departemento Orientaj Pireneoj parolis katalune.

Sub la voko „gardarem los pannèus” (ni konservos la afiŝojn) kaj „per la lenga

occitana” (por la okcitan lingvo) manifestaciantoj marŝis ĝis unu el la afiŝoj ĉe eniro de la urbeto. Ili reiris en la urbodomon, kie aperitivo kaj manĝeto estis proponataj.



FERRIOL MACIP | BONNET



FERRIOL MACIP | BONNET

Ekstremnaciisma

La kortumo de Monpeliero akceptis la sintenon de la t.n. Respublika Movado por Publika Bono (*Mouvement Républicain de Salut Public*). Tiu ĉi franca organizaĵo, ekstremnaciisma, postulis la demeton de la tri okcitanlingvaj afiŝoj sub tiuj, kiuj anoncas la urbonomon en la franca lingvo *Villeneuve lès Maguelone*.

En sia verdikto diris la juĝisto, ke *la franca estas la lingvo de la Respubliko* kaj ke ĝi estas uzenda en ĉiuj publikaj informoj. Li opiniis krome, ke okcitanlingvaj afiŝoj kreas konfuzon al veturantoj alvenantaj en la urbeton.

Rekono

Manifestaciantoj postulis leĝon por la t.n. regionaj lingvoj kaj konstitucian rekono de la lingva diverseco en la franca respubliko.

Francio ankoraŭ ne ratifis la Eŭropan Ĉarton pri Minoritataj Lingvoj, opiniante, ke ĝi kontraŭas la duan artikolon de la franca konstitucio. Tiu teksto, ke la lingvo de la Respubliko estas la franca.

FERRIOL MACIP | BONNET



FERRIOL MACIP | BONNET



FERRIOL MACIP | BONNET

Ekonomio ekologia



La belga asocio *Econopolis* unuafoje kunmetis indicon koncerne la ekologion de la ekonomio en 27 eŭropaj landoj. Ĝi komparis ĉiujn landojn de Eŭropa Unio escepte de Malto kaj Kipro, sed aldonis Svislandon kaj Norvegon, ĉar tiuj du landoj ĉi-rilate elstaras.

Por kunmeti la indicon oni atentis pri jenaj kvin donitaĵoj:

- transporto: kilometroj faritaj por ĉiu loĝanto kaj transporteblecoj uzataj por kargoj
- energio: renovigebla energio kaj efika uzo
- medio: biodiverseco
- renovigo: patentoj pri verda teĥnologio
- materialuzo: efika uzo de krudmaterialoj kaj pritrakto de rubaĵoj.

La donitaĵojn oni kolektis ĉe Eurostat, Unuiĝintaj Nacioj kaj Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE). *Econopolis* intencas aktualigi la indicon ĉiun trimestron.

Jenas la rezultoj en novembro 2010:

Ivo DURWAELE

Rango	Lando	Poentoj
1	Svislando	68
2	Luksemburgio	65
3	Norvegio	62
4	Danio	49
5	Svedio	48
6	Aŭstrio	47
7	Germanio	42
8	Nederlando	41
9	Britio	41
10	Irlando	37
11	Francio	37
12	Italio	35
13	Belgio	32
14	Finnlando	31
15	Hispanio	29
16	Portugalio	28
17	Latvio	28
18	Grekio	27
19	Slovenio	26
20	Slovakio	21
21	Ĉeĥio	21
22	Pollando	22
23	Hungario	20
24	Rumanio	20
25	Litovio	18
26	Estonio	15
27	Bulgario	13



Tunelo anstataŭ ĥaoso aŭ ĉu nur ĥaoso?

Konataj en Germanio estas la rakontoj pri la fikcia urbo Schilda [ŝilda] kaj ties civitanoj. Ili ofte montras strangan solvon por problemoj, pli precize: strangan kreon de problemoj.

Kiam la ŝildanoj konstruas novan, pompan urbodomon, la arkitekto forgesas la fenestrojn kaj en la urbodomo estas tute mallume. Tiam la ŝildanoj provas kapti la sunlumon per sitejoj kaj enporti ĝin, kompreneble sen-sukcese. Iam ili volas esti sendependaj de multekosta aĉeto de salo. Ili decidas mem kulturi salon kaj „semas” salon, disverŝante ĉarplenon da salo sur la urban kampon. La rikolto ne sukcesas, ĉar ili rikoltas nur urtikojn.

Ĉar sur la urba muro kreskegas herbo, kelkaj proponas, ke bovino formanĝu ĝin. Ili volas levi ĝin sur la muron kaj tial metas ĉirkaŭ ĝian kolon

ŝnuregon, kiu fine strangolas la beston. Por protekti la valoran preĝejan sonorilon, ili kaŝas ĝin en lago. Por memori, kie ili subakvigis ĝin, ili eltranĉas noĉon en la lignan randon de la boato. Poste ili ne plu trovas la sonorilon. Kolere ili fortranĉas la noĉon.

Arbotrunkoj

La ŝildanoj bezonas trabojn kaj tial dehakas arbojn. Portante ilin laŭlonge de la muro, ili konstatas, ke la arboj estas tro larĝaj por la pordego. Ili dekstre kaj maldekstre detruas la muron kaj sukcesas porti la arbotrunkojn en la urbon. Nur nun ili ekkompenas, ke ili ja povis

porti la trunkojn laŭ la longo tra la pordego. Tuj ili reportas la trunkojn antaŭ la urbomuron, riparas la muron kaj denove enportas la arbojn tra la pordego.

Kial mi skribas pri tiuj rakontoj? Mi vivas en urbo, kiu ege konkurencas kun la ŝildanoj. La tiel nomata reĝoplaco – germane „Königsplatz” [kéniksplac], kvankam jam de pli ol 90 jaroj ne plu estas monarĥio – estas centro de publika trafiko. Ĉiuj tramaj kaj multaj busaj linioj uzas la placon kiel centran ŝanĝostacion. La fervoja ĉefstacidomo, kiu bezonas renovigon, situas kelkcent metrojn for.

Tramlinio

Antaŭ malmultaj jaroj la magistrato proponis ŝtatajn subvenciojn por rekonstruigi kaj modernigi kaj la placon kaj la stacidomon kaj la tramlinion, kies reloĵ nun kondukas preter la stacidomo. Estus pli taŭge, se la tramo haltus rekte sub la stacidomo. Komenciĝis intertraktoj kun federaciaj kaj fervojaj kaj aliaj instancoj.

La opozicio kontraŭis kaj iniciatis publikan voĉdonadon, postulante „tunelon anstataŭ ĥaoso”. Venkis la opozicio ne nur en la voĉdonado sed ankaŭ en la sekvaj balotoj. Tute nova kandidato, kiu antaŭe neniam estis en politiko, kiu eĉ ne estis membro de la sin subtenanta kristan-sociala partio, konkeris la seĝon de ĉefurbestro.

Projektoj

Nun montriĝas, ke la projektoj de la malnova magistrato ne estis malbonaj sed, male, pli bonaj ol tiuj de la nova. La opinio de la ĉefurbestro pri la projektoj



Nun montriĝas, ke la projektoj de la malnova magistrato ne estis malbonaj...

tiel ŝanĝiĝis, ke li nun faras la samon, kiel la antaŭaj planis.

Spertulo proponas lasi la centron senaŭtomobila, konduki trafikon ĉirkaŭ la urbocentro kaj pligrandigi la zonan por piedirantoj. Tuj organiziĝis nova protesto cele al aŭtotunelo. La ĉefurbestro, kiu dum la balotkampanjo mem varbis por „tunelo anstataŭ ĥaoso” nun tute kontraŭis tunelon.

Banejo

Okazas pliaj „ŝildecaj” eventoj. Pro manko de mono por ripari urbo- mezan banejon, juvelon de secesia stilo, la ĉefurbestro proponis ĝin fermi. Kolektiĝis kontraŭ la decido 16 000 subskriboj. Kiam la iniciatintoj donis la subskribojn al la ĉefurbestro, ankaŭ tiu subskribis, aliĝante al la „volo de la popolo”.

Simile la urba teatro. Noverekonstruita en 1952, ankaŭ ĝi bezonas riparojn. La magistrato proponis okazigi spek-


taklojn dum la riparperiodo en granda kontenero. Protestis aktoroj kaj publiko. Sed kiam grupo de 50 aktoroj vizitis magistratan kunsidon, la magistratanoj post kvar horoj prokrastis la decidon, ĉar jam atendis 150 vizitantoj pro alia afero.

Vidlinioj

Ankaŭ la nove konstruita glacispor- tejo ne akcepteblas. Spektantoj konstatis, ke pro malbonaj vidlinioj ili ne bone povis rigardi la ludareon. La arkitektoj promesis plibonigojn, volante interalie levi la glacisurfacon. Sed tiu solvo kontentigas nek la magistraton nek la zelo- tojn de la glaciĥokea teamo.

Ankoraŭ ne estas respondita la de- mando, kiu respondecas kaj kiu pagas pro la diversaj fuŝoj. Intertempe mi daŭre legas anekdotojn pri la Schilda- anoj. Konsolas min, ke en aliaj urboj kaj aliaj tempoj okazis similaj aferoj.

Jomo IPFELKOFER



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandano. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagy.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
#Prezo ĉe FEL: 24,00 € +
afranko (tradicia bindita
versio), 14,40 € (ePub aŭ
Mobipocket).

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

ĈINIO

Floras „enklavo” komunista

La vilaĝo Nanjie troviĝas en Linying, Henan-provinco, meza Ĉinio, kaj okupas 1,78 kvadratajn kilometrojn. Enirante la vilaĝon, oni kvazaŭ revenas al la periodo de la tiel nomata Kultura Revolucio, kiu furiozis dek jarojn en la tuta lando.



1



2



Meze de la granda placo Orienta Ruĝo alte staras blanka marmora statuo de Maŭ Zedong kun surskriboj sur la dorso: Maŭ Zedong estas ne dio, sed homo, tamen lia penso superas dion. Ambaŭflanke de la statuo gardostaras du gravmienaj milicianoj, kaj ĉirkaŭ la placo staras grandaj portretoj de Markso, Engelso, Lenino kaj Stalino kaj flirtas ruĝaj flagoj kaj sensaciaj sloganoj.

Sed ĉio ĉi eksmoda akre kontrastas kun moderna industria komplekso, ekoagrikultura parko, bela setlejo, perfekte ekipitaj lernejoj, infanĝardeno, amuzejo kaj hospitalo, kiuj estas bonorde aranĝitaj en la vilaĝo. Tie trankvile vivas pli ol 3000 homoj en bela kaj komforta medio.

Proprietaĵo

Ĉiu familio loĝas en samspeca apartamento kun elektraĵo.

Tamen la vilaĝanoj havas preskaŭ ne niun proprietaĵon, ĉar la komunumo senpage liveras ĉion necesan por la ĉiutaga vivo. La vilaĝanoj atribuas la feliĉan vivon al la vilaĝestro Wang Hongbin, kiu kondukis la vilaĝon al ĝia sukceso.

En 1979 Ĉinio lanĉis novan politikon: reformadi en la interno kaj al la ekstero malfermi la pordon. La reformado estis provita komence en la kamparo. La socialisma principo „al ĉiu laŭ ties laboro” estis efektivigita per la enkonduko de respondecosistemo. Tiel familioj kontraktis pri produktado de difinitaj kvotoj sur asignitaj parceloj da tero, kun la rajto reteni ĉion super la kvoto, dum la terposedo restis kolektiva.

La registaro permesis al kamparanoj entrepreni brutobredadon kaj aliajn flankajn okupojn konvenajn al la lokaj kondiĉoj. Tio liberigis la kamparanojn el la sistemo de kolek-



tiva produktado, kiu katenis ilin jam de dekoj da jaroj, kaj ĝi ekscitis la indviduan iniciatemon. Post nur du jaroj la reformado atingis rimarkindajn rezultojn. Inter 1979 kaj 1981 la agrikultura produkto de Ĉinio kreskis averaĝe je 5,6 %, pli alte ol la nuraj 2,9 % dum la 20 jaroj inter 1958 kaj 1978.

Brikejo

Grandaj ŝanĝiĝoj okazis ankaŭ en la vilaĝo Nanjie. Por iom riĉiĝintaj vilaĝanoj la unua afero kompreneble estis starigi proprajn novajn domojn. Tiam venis en la kapon de la vilaĝestro Wang Hongbin la ideo starigi kolektivajn brikejojn, ĉar la produktaĵoj estas facile vendeblaj kaj la vilaĝo havas naturan avantaĝon. Li kunvokis estraranojn de la vilaĝo por interkonsiliĝi pri kapitalo de la brikejo.

Fine ili decidis anticipe oferti al la vilaĝanoj brikojn je konsiderinde pli malalta prezo, kaj al ĉiu familio estis permesite antaŭmendi maksimume 30 000 brikojn – sufiĉan kvanton por unu domo. Ene de tri tagoj la vilaĝo ricevis 350 000 juanojn, necesan sumon por starigo de la brikejo. La brikejo sukcese ekfunkciis kaj la vilaĝo kontrakte konfidis ĝian administron al individuo. Dum la postaj jaroj la brikejo tre prosperis.

Sed multaj plendis, ke la administranto multe profitas de la brikejo, tamen la vilaĝanoj ricevas preskaŭ neniam da avantaĝo. Tio pensigis la vilaĝestron Wang, kiu klopodis serĉi riĉigan vojon por siaj kolegoj. En 1986, konsiliĝinte kun aliaj estraranoj, li decidis reakiri la brikejon kaj meti ĝin sub la kolektivajn administron.

Entuziasmo

La estraro alvokis, ke la vilaĝanoj redonu proprajn parcelojn al la vilaĝa komunumo, kaj promesis, ke tiuj, kiuj redonis proprajn parcelojn, estos engaĝitaj al kolektivaj entreprenoj kaj iliaj familianoj senpage ricevos porcion da nutraĵoj en ĉiu monato. Pro la sekureco de vivteno la vilaĝanoj respondis kun entuziasmo. La vilaĝo starigis entreprenojn pri nutraĵa prilaboro, kaj la produktaĵoj ha-

vis grandan debiton en la tuta lando pro relative malalta prezo. En 1989 la malneta produkto de tiuj entreprenoj atingis 21 milionojn da juanoj.

La disvolviĝo de la vilaĝo estas neimageble stranga. En la 1990-aj jaroj la vilaĝo ricevis grandsuman krediton el bankoj, kaj danke al tio la kolektiva ekonomio iris en periodon de rapida ekspansio. La vilaĝo starigis modernan industriajn komplekson de 26 fabrikoj koncernaj al manĝaĵoj, kondimentoj, farmacio, trinkaĵoj, biero, presado, pakado ktp.

Parto de la produktaĵoj estas eksportataj al Rusio, Mongolio, Kanado kaj Usono. La industria prospero akcelis la disvolviĝon de agrikulturo. La vilaĝo establis ekokultivejon konsistantan el pli ol dek grandaj forcejoj faritaj el plej freŝaj materialoj, per la investo de 15 milionoj da juanoj.

Apartamento

La granda profito subtenis la konstruadon de la vilaĝa infrastrukturo. Dum la pasintaj jaroj la vilaĝo starigis kvartalon kun 900 apartamentoj, infanĝardenon, lernejojn, hospitalon, amuzejon kaj aliajn bazajn instalaĵojn. Ĉiu familio de la vilaĝo ricevis duĉambran aŭ triĉambran apartamenton kun hejmaj elektraj aparatoj laŭ la nombro de familianoj. Eduko, kuraco kaj ĉiuj aliaj servoj estas senpage por oficialaj membroj de la komunumo.

La vilaĝestro Wang diris, ke la fina celo de la vilaĝo estas anstataŭigi la privatan proprieton per la komuna kaj riĉigi la komunumon, tiel ke ĝiaj membroj ne havos eĉ unu cendon da deponaĵo. La distribuo al la vilaĝanoj konsistas el salajro kaj provizo, interalie la salajro okupas nur 30 %.

Riĉigo

En 2009 la pokapa distribuo kalkuliĝis al 6700 juanoj. Wang diris, ke la vilaĝa estraro sin dediĉas al la komuna riĉigo, la komunumo pliiĝos kaj altigos la provizon al siaj membroj por fine realigi la publikan posedantecon de ĉiuj rimedoj de la produktado kaj vivo.

Pro sia granda sukceso la vilaĝo estas honorita kiel Ekologia Vilaĝo kaj unu el la Dek Vilaĝoj de Ĉinio. Ĝi fariĝis modelo lernata de aliaj vilaĝoj kaj altiras fremdulojn. Multaj dungitoj de la vilaĝo revas akiri la „verdan karton”, tamen tio estas tre malfacila, ĉar ĝin rajtas peti nur tiuj, kiuj jam laboris 10 jarojn en la vilaĝo kaj estis honoritaj kiel avangarda laboranto. Dum la pasintaj 20 jaroj nur pli ol 300 fremduloj sukcese fariĝis oficialaj membroj de la vilaĝo.

Egalismo

Laŭ statistiko la kolektiva ekonomio de la vilaĝo 2100-obliĝis dum pli ol 20 jaroj. Iuj demandis, ĉu la evoluo de la vilaĝo kiel popola komunumo estas daŭrigebla? Neniam ĉesis disputo pri la vilaĝo malgraŭ la fakto de granda sukceso. „Ĝia nocio pri la valoro estas malmoderna kontraste kun la nuna merkata ekonomio kaj ne konformas al la sociaj cirkonstancoj, ĉar ĝi praktikas egalismen kaj malpermesas al siaj membroj partopreni en la merkata konkurenco,” diris profesoro Xia Xueluan el la Pekina Universitato.

Li aldonis: „Grava faktoro de la sukceso estas bona gvidanto, kiu ĝuas absolutan aŭtoritaton en la vilaĝo, ĉiuj obeas lin kaj volas sekvi lin, kaj ĝuste pro tio la vilaĝo restas prospera.”

Tamen Wang estas trankvila kaj memfida vizaĝe al kritikoj kaj moko. Li diris, ke la mondo estas malsaĝula, la malsaĝuloj subtenas kaj kreas ĝin, kaj fine ĝi apartenas al la malsaĝuloj. Tiu filozofia parolo eble povus klarigi, kial la vilaĝo persistas en sia vojo.

Alice Lu

Fotoj (faritaj de la aŭtoro):

1. Ornamas la vilaĝon grandaj pentraĵoj.
2. Homo kun superdiaj pensoj: ankoraŭ floras la filozofio de Maŭ Zedong.
3. Ĉie en la vilaĝo videblas memorindaĵoj pri la tiel nomata Kultura Revolucio kaj ties iniciatinto.
4. Ĉiu vilaĝano havas samspecan du- aŭ triĉambran apartamenton.
5. Ne gravas al la vilaĝestro, Wang Hongbin, ke oni taksas lin malmoderna en la merkat-ekonomia mondo.

Junaj virinoj for de la amo

Mia najbaro havas belan filinon pli ol 28-jaraĝan. La knabino ĉiam havis bonajn notojn en ekzamenoj, ĉu en elementa lernejo, ĉu en gimnazio. Fine ŝi sukcese trapasis ekzamenon por eniri universitaton. Ĝuste pro tio ŝiaj gepatroj fieris.

Antaŭ kvar jaroj la filino diplomitiĝis kaj pro ŝia bonedukiteco kaj saĝeco facile trovis kontentigan laboron ĉe granda kompanio. Certe ŝia salajro estas sufiĉe alta kompare kun tiuj de ŝiaj samgeneracianoj. Nun ŝi laboras en alia urbo kaj nur dum la printempa festo, la plej grava tradicia festo por ĉinoj, vizitas sian familion.

Sano

Lastatempe ŝiaj gepatroj maltrankviliĝas kaj eĉ ĉagreniĝas pri sia filino. Nek pro ŝia sano, nek pro ŝia laboro, sed pro ŝia nefianĉiniĝo.

Laŭ la ĉina leĝaro 20-jara knabino rajtas edziniĝi. Krome, laŭ la ĉina tradicio, 25-jara knabino jam estu edzino. Tamen nuntempe multaj junaj virinoj en tiu ĉi aĝo eĉ ne havas fianĉon, precipe en grandaj urboj. Amaskomunikiloj informas, ke en la ĉina ĉefurbo Pekino vivas ĉ. 650 000 virinoj needziniĝintaj. Preskaŭ ĉiuj estas saĝaj kaj bonedukitaj kaj havas bonajn laborkondiĉojn.

Fianĉoj

Ĉu la nombro de virinoj estas pli granda ol tiu de viroj en Ĉinio? Certe ne. Kial do junaj virinoj grandnombre ne



trovas taŭgajn fianĉojn?

Esploris specialistoj, kiuj trovis, ke virinoj tiaj elstaris en siaj universitatoj kaj estas kapablaj en siaj laboroj. Tamen, lernante, ili atentis pli pri siaj studoj ol pri amikeco, aparte kun junaj viroj. Tiam, eklaborinte, ili konstatis, ke la plej bonaj viroj jam havas fianĉinojn kaj eĉ edziĝis. Restas nur viroj netaŭgaj.

Socio

La problemo ekzistas ne nur por familioj sed ankaŭ por la ĉina socio. Pro tio en Ĉinio multaj organizaĵoj nun aranĝas renkontiĝojn por tiuj, kiuj ankoraŭ ne geedziĝis. Tamen ŝajne la rezultoj ne aparte esperigas.

Okazas tiam konfliktoj en la familioj. Gepatroj murmuris al siaj filinoj pri edziniĝo; la filinoj sentas sin malfeliĉaj kaj ekloĝas for de siaj gepatroj. Krome en parkoj ofte videblas gemezaĝuloj, kiuj serĉas taŭgan junan viron por bofiligi.

Jen fenomeno pli kaj pli ofta ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en aliaj landoj: junaj virinoj for de la amo.

Xu Jinming

Plibonigoj



TIM WATERS

Pli ol du jarojn post la sendependiĝo de Kosovo, oni konstatas notindajn ŝanĝojn. Novaj domoj estas konstruataj, same kiel novaj entreprenoj kaj aŭtoŝoseoj, ekzemple tiu inter la landlimoj kun Albanio kaj Serbio, kiu kostas 700 milionojn da eŭroj.

Rimarkeblas similaj plibonigoj en publikaj servoj, kiel poŝto kaj edukado. Tamen restas malriĉeco. La relative juna popolo (meza aĝo malpli ol 27 jaroj) esperas pri libera moviĝo ene de Eŭropo kadre de aliĝo al Eŭropa Unio. Tiel kredeble pliboniĝos la ekonomia situacio.

Bardhyl SELIMI

KURACILOJ

Kipro eksportas, Ĉinio importas

Kion eksportas la malgranda Kipro al la mondo? Jam delonge forpasis la tempo, en kiu la lando fosis kaj eksportis kupron, metalon kies nomo signifas ĝuste „kiprodevena”. Pro la sama kialo cetere la insulo aperas kuprokolora centre de la propra flago. Tamen, ankaŭ la nuntempa Kipro havas kelkajn produktojn por eksporti.

Ne nur citrusoj

Ties pampelmusojn kaj aliajn citrusojn oni trovas jam en tuteŭropaj fruktovendejoj, sed ne estas konate, ke en tiu mez-orienta landeto aktivas ankaŭ rimarkinda farmacia industrio. Nur en la urbo Limasolo ekzistas tri kompanioj, kies instalaĵoj donas laboron al centoj da homoj, sciencistoj kaj simplaj laboristoj.

La medikamentojn oni vendas tra la tuta insulo, sed ankaŭ eksterlande: kiom ajn nekredebla tio aspektas, unu el la ĉefaj importantoj de kipraj kuraciloj estas Ĉinio, la lando en kiu, laŭ ofta supozo, hodiaŭ estas fabrikata ĉio ajn.

Pro serĉado de laboro

Tiu komerco tre utilas al la ekonomio de Kipro, kiu ne dependu sole de turismo. La plej malnova kompanio estas *Medochemie*. Ĝi komencis agadi en 1976, por helpi la gekipranojn kiuj, perdinte sian tutan havaĵon pro la tragikaj faktoj de 1974, senespere serĉis laboron kaj elmigris al ne-okupitaj urboj de la sudo. Nuntempe *Medochemie* disponas pri naŭ grandaj instalaĵoj, el kiuj unu troviĝas en Nederlando. En ili laboras 1200 personoj, pliparte sciencistoj. La kompanio havas 19 eksterlandajn oficejojn, promociantajn ties 3800 ekvi-

valentajn aŭ ĝeneralajn medikamentojn (t.e. medikamentoj kies patentprotektito forfalis kaj kiuj povas esti kopiataj de iu ajn), divideblajn en dek kuracilajn kategoriojn. Krom la kipra registaro, eĉ EU trifoje premiis tiun kompanion.

Tuj poste indas mencii la firmaon *Remedica*. Malfermita en 1980, ĝi estas malpli granda ol *Medochemie* kaj kun siaj 480 produktaĵoj, inter kiuj analgeziloj kaj vitaminoj, ĉefe strebas al la ekstera merkato. Danke al nebridebla kresko, ĝi ĉeestas en pli ol cent landoj ĉiukontinentaj, kaj pretas jam malfermi sian duan instalaĵon. Rimarkindas, ke ĝi provizas ankaŭ neprofitcelajn organizaĵojn, kiel Monda Organizaĵo pri Sano, Unicef kaj Kuracistoj sen landlimoj.

Perbuŝaj kuraciloj

La tria farmacia fabriko de Limasolo nomiĝas *Vogen Laboratories Ltd*. Fondita en 1985, ĝi limigas sin al la produktado de perbuŝaj kuraciloj, kiel antibiotikoj, antisepsaĵoj kaj kontraŭinflamaj medikamentoj. Kvankam malpli konata ol la aliaj du kompanioj, ĝi paradas per volumeno, kiu varias inter 1 kaj 2,5 milionoj da usonaj dolaroj jare.

Roberto PIGRO



Estis iam alfabeto ...

Komence de multaj kursoj pri Esperanto oni kutime prezentas al la lernantoj la alfabeton. Por okcidentuloj temas pri facila afero: ĝi fakte tute similas al tiu de la plimulto de latinidaj, ĝermanaj kaj iuj slavaj lingvoj. Iom pli komplika tia leciono aperas al esperantistoj el orientaj landoj, kiuj tamen same bone eklernas legi kaj skribi en la internacia lingvo danke al preciza respondo inter grafemoj kaj prononco. Sed kial ne diri kelkajn vortojn pri la origino de ĉi tiu alfabeto? Ĉu oni demandis sin iam, al kiu oni ŝuldas tiel gravan elpensadon kaj de kie precize ĝi devenas?

Naskiĝejo de la latina alfabeto

Ni komencu ĉe la due, post Kreto, plej granda greka insulo: ĝia historia nomo estas „Eŭboja” (en PIV „Eŭbeo”), kvankam lastatempe oni emas adopti la novgrekan formon „Evia”. Temas hodiaŭ pri sufiĉe ŝatata turisma alvenpunkto, eble ankoraŭ ne malkovrita de turistoj je la nivelo de Mikonos kaj Santorino, malgraŭ belega maro kaj riĉa vegetaĵaro. Malmultegaj tamen, eĉ inter la grekoj, scias, ke tiu insulo estis la naskiĝejo de prafarmo de la latina alfabeto kaj sekve – por tiel diri – la patrino de dekoj da modernaj skribformoj.

El Kalcido kaj Kimo, du ankoraŭ ekzistantaj eŭbeaj urboj, elnavigis iam lokaj koloniistoj kun la celo establiĝi en la proksima suda Italio. Tiu koloniado estis nekutime ampleksa: en suda Italio ekloĝis pli da grekoj ol en la tuta Grekio, kio klarigas la tre disvastiĝintan esprimon „Granda Grekio” por indiki tiujn regionojn.

Per siaj ŝipoj la koloniistoj portis tien plurajn tradiciojn kaj kultojn el Eŭbeo. Inter ili kaŝiĝis altvalora donaco por la eŭropa kontinento: tio, kion en la plimulto de la lingvoj oni ankoraŭ nomas „alfabeto”, laŭ la unuaj du literoj (*alfa* kaj *beta*) de la greka skribsistemo. Ĝiaj

inventintoj ne estis la helenoj, kiuj nur depruntis ĝin de la fenicoj – en 770-750 antaŭ nia erao – kaj oportune alĝustigis ĝin al la bezonoj de sia lingvo. La greka estis ekzemple ege pli riĉa je vokaloj ol la semidaj lingvoj; tial por ĝia skribo oni uzis superflujajn fenicajn literojn, kiuj respondis al fonemoj (ĉefe guturaloj), kiuj forestis en la greka. Tiel naskiĝis la unua alfabeto utiligata por skribi hindeŭropan lingvon: skribsistemo utila kaj praktika, en kiu al ĉiu litero respondis fonemo malsama.

La greka

Parto de la ĉi-revua legantaro certe konas la grekan alfabeton (fakte en pluraj landoj ankoraŭ daŭras humanisma tradicio kaj oni ankoraŭ lernas la tiel nomatajn klasikajn lingvojn¹). Eble tamen ne ĉiuj scias, ke dum la arkaika epoko – en la 8a-6a jarcentoj antaŭ nia erao – en Grekio ĉiu *polis* (t.e. civito), estante memstara, utiligis malsaman dialekton kaj propran version eĉ de alfabeto. Grekaj alfabetoj sufiĉe intersimilis, sed ne mankis diferencoj, koncernantaj ekzemple la rotacion de iuj literoj, la eblon distingi la longecon de kelkaj vokaloj aŭ la ĉeeston de komenca aspiracio. Oni distingas tri grupojn de alfabetoj, laŭ

FE	FE	B	E
-	F	F	(F)
I	I	I	Z
BH	BH	BH	H
⊗⊕⊙	⊗⊕⊙	⊗⊕⊙	⊙
I	I	I	I
K	K	K	K
ΓΛ	Λ	ΓΛ	Λ
ΓM	ΓM	ΓM	M
ΓN	ΓN	ΓN	N
Ξ	(XΞ)	Ξ	Ξ
O	O	O	O
Γ	Γ	Γ	Π
-	-	M	(M)
Q	Q	Q	(Q)
PQ	PR	PR	P
ε	ς	-	Σ
T	T	T	T

diversaj apartaĵoj: konvencie oni parolas pri verdaj, bluaj kaj ruĝaj alfabetoj. Nur en 403 a.K. la blua – t.e. la ionia – alfabeto disvastiĝis en la tutan greklingvejon², anstataŭante la ceterajn. En la 8a jarcento a.K. tamen Eŭbeo ankoraŭ uzis la propran (ruĝan) alfabeton, kiu estis adoptita de etruskoj, latinoj kaj aliaj italiaj popoloj kaj nuntempe de preskaŭ la duona mondo – anstataŭ la „tradicia” (blua) greka alfabeto, kiun oni instruas en multaj gimnazioj tutmonde.

La helena geografo Strabono rakontas, ke la eŭbeanoj, kiuj devenis el du malsamaj urboj (Kimo kaj Kalcido), atinginte la insulon Ishia (antikve nomatan Pitakuso) kaj de tie la marbordon de Kampanio, decidis, ke la nova italia kolonio havu de Kimo nur la nomon (latinlingve „*Cumae*”), sed oficiale apartenu al Kalcido. Laŭ la latina aŭtoro Velejo Paterkulo, ili alvenis al Kampanio sekante la flugon de kolombo. El tiu italia regiono devenas multaj surskriboj en eŭbea alfabeto, kiu estas en la bazo de la etruska kaj de la latina.

Resume, en la angla, en la franca kaj eĉ en Esperanto ni utiligas la antikvan regionan grekan alfabeton! Se oni ne kredas tion, oni turnu je 90 gradoj la grekan literon Δ (ĝi mirakle fariĝos tre

eŭbea	iona	atena	korinta	moderna
A	AA	AA	AA	A
B	B	B	Π	B
<<	Γ	Λ	<<	Γ
ΔΔ	Δ	Δ	Δ	Δ
ƆE	ƆE	ƆE	Β	E
Ɔ	-	Ɔ	Ɔ	(F)
I	I	I	I	Z
ΘH	ΘH	ΘH	ΘH	H
⊗⊕⊖	⊗⊕⊖	⊗⊕⊖	⊗⊕⊖	Θ
I	I	I	I	I
K	K	K	K	K
Λ	ΓΛ	Λ	ΓΛ	Λ
ΜΜΜ	ΜΜ	ΜΜ	ΜΜ	M
ΝΝ	ΝΝ	ΝΝ	ΝΝ	N
X	Ξ	(Xς)	Ξ	Ξ
O	O	O	O	O
Πρ	Π	Π	Π	Π
M	-	-	M	(M)
Q	Q	Q	Q	(Q)
P	PΔ	PΡ	PΡ	P
ς	ξ	ς	-	Σ
T	T	T	T	T
ΥΥV	ΥV	ΥΥV	ΥΥV	Y
ΦΦ	Φ	ΦΦ	ΦΦ	Φ
ΥV	X	X	X	X
(Φς)	ΥV	(Φς)	ΥV	Ψ
-	Ω	-	-	Ω

simila al nia D). Kaj kiu estas la malsameco inter Λ kaj L, se ne ankaŭ ĉi-okaze la simpla rotacio de la litero? Koncerne la grekajn literojn Σ kaj P, oni devas scii, ke en la ruĝaj alfabetoj Σ estis skribata ne per kvar, sed per nur tri strekoj (jen la origino de la latina S), dum en kelkaj civitoj P posedis plian diagonalan streketon (R). Rimarkindas fine, ke al la helenoj oni ŝuldas ne nur la latinan alfabeton, sed ankaŭ la cirilan, uzatan en Rusio kaj aliaj slavaj landoj. Ties unuan version, nomatan „glagolica alfabeto”, verŝajne elpensis du sanktuloj (Cirilo kaj Metodo), kiuj adaptis la grekan alfabeton al la necesoj de la slava fonologio, por traduki la Biblion kaj aliajn kristanismanajn tekstojn kun la celo evangelizi novajn landojn.

Roberto PIGRO

1. Redaktoro Gerrit Berveling laboras kiel instruisto tiufaka. Tiu ĉi artikolo estis escepte redaktita de li, kaj ankoraŭ ne de la nova redaktoro pri lingvoj (vidu p. 5).

2. Vera greka lando en nuna senco ankoraŭ ne ekzistis; la greklingvejo etendiĝis tra pluraj regionoj mediteraneaj (noto de la redaktoro).

bildo: [wikipedia.org/wiki/File:Griechisches Alphabet Varianten.png](http://wikipedia.org/wiki/File:Griechisches_Alphabet_Varianten.png)



**Kontribuojn por la rubriko
Lingvo de Monato
kunlaborantoj sendu al
lingvo@monato.net.**

Santiago Florbuĉanto

En 2010 la urbo Santiago de Compostela, la celo de la Vojo Jakoba en la galega parto de Hispanio, atendis eksterordinare multajn pilgrimantojn pro Sankta jaro. Ĉiuloke estis videblaj la emblemo de la festojaro kaj bildoj de la sanktulo. Pro lia legenda venka interveno en la batalo de Clavijo, post kiam meze de la 9a jarcento la kristana reĝo Ramiro rifuzis liveri la jaran tributon de cent virgulinaj al la muzulmanaj malamiko, ekestis lia kromnomo „Matamoros”, kio signifas „Buĉanto de la maŭroj”. Memkompreneble ankaŭ la artistoj ne evitis la prezentadon de la sanktulo kiel kavaliro rajdanta surĉevalo, kun glavo enmane, kaj la dispecigitaj viktimoj sub la hufoj de lia ĉevalo. Tiel li ofte aperas surbilde kaj kiel statuo, nerare vivogrande, en preĝejoj.

Ankaŭ en la katedralo de Santiago ekzistas tia impona memorigilo, kaj longe ĝi povis elstarigi la sanktulon kiel

savanton de la kristana Hispanio. Ne niun ŝokis la kruelaj detaloj, ĝis pli delikata kaj sentema socio, do la aktuala, ne plu povis elteni la religiajn imagojn pri mezepoka batalo. Pli precize, ĝi ne plu volis konfronti la tiam malvenkintan kulturon kun tiaj incitaj, nuntempe „politike maloportunaj” restaĵoj.

Aŭtenta skulptaĵo

La respondeculoj de la katedralo ne kuraĝis ne reagi al la evidenta opiniŝanĝiĝo en la sekulara socio, aparte en jaro kun alfluo de pilgrimaj kaj turistaj amasoj. Ilian elturniĝon povis konstati tiujaraj pilgrimantoj. Ĉe la koncerna loko, senintuaj homoj vidis nur impetan rajdanton, kavaliro, ne nepre sanktulon, kaj trankvile preterpasis tiun ekzotikaĵon sen ekscitiĝo aŭ konscienciproĉoj. Sed tiuj, kiuj konis la aŭtentan statuon, mire provis serĉi ĝian skandalan bazon. Nor-



BITA ROSSLER-RUCKEL

malstaturaj homoj ne plu povis vidi la subsanktulan okazintaĵon. Ĝi simple kaj senkulpe kaŝiĝis – malantaŭ la ondado de impona flormaro.

Festjara kamuflado

Oni ja povus ridi pri la inventemo de la kanonikoj, eĉ fari ŝercon, se la hispana lingvo tion plene permesus: el „Santiago Matamoros” estiĝus „Santiago Matafloros” – la Maŭrbuĉanto transformiĝus al Florbuĉanto, se la hispana pluralo de „floroj” („*flores*”, sed ne „*floros*”) permesus pli striktan rimadon. Sed la afero estas pli serioza. Ĉu iu vere volas kredi, ke kamufla festjara florornamaĵo kapablas mildigi historiajn eventojn? Ĝi nur taŭgas por kontentigi homojn, kiuj kredas sin pli moralaj ol la aliaj. Ili ne volas lerni el la kruda historio, nur forŝovas ĝin. Kaj hejme ili tamen avidas renkonti kadavrojn, nome en la televido, pli ofte ol iam ajn viditajn en religiaj cirkonstancoj. La kaŝado de la pasinteco ne aŭtomate kondukas al pli paca socio, ne purigas religiojn kaj ne evitigas estontajn kruelaĵojn.

Franz-Georg RÖSSLER



BITA ROSSLER-RUCKEL

NEDERLANDO

Islama universitato rekonita

En 1997 grupo da nederlandaj islamanoj de diversaj kulturaj kaj lingvaj tradicioj fondis la tiel nomatan *Islaman Universitaton de Roterdamo*. La fondintoj estis de turka, maroka, egipta, palestina, surinama kaj somalia devenoj. Tio respregulas la buntecon de islamo en Nederlando.



IUR



IUR



Nomi organizaĵon universitato ankoraŭ ne signifas, ke efektive ĝi funkcias kiel vera universitato. Por ke tio realiĝu, necesis multe da laboro: prepari kursojn, zorgi pri financa bazo, interkonsiliĝi kun universitataj kaj registaraj instancoj, varbi studentojn, venigi rekonatajn profesorojn kaj tiel plu. Fine, la 9an de junio 2009, oni en Roterdamo povis ĝoje festi, ke la IUR estas oficiale rekonita de la koncernaj instancoj en Nederlando kaj Belgio kiel universitato. La dekanon, profesoro Ahmet Akgunduz, okaze de tiu celebrado diris: „Islamo konsideras la tutan homaron kiel unu familion. Komune estas al ni, ke ni ĉiuj adoras Dion, kaj ke ni ĉiuj estas idoj de Adamo.” Samdate, esprimante grandajn atendojn pri la nova islama universitato, alia profesoro memorigis, ke antaŭ jarcento ankaŭ la fondiĝo de la unua nederlanda romkatolika universitato estis granda novaĵo. La lekcion okazas grandparte en la nederlanda, parte en la turka, angla aŭ eventuale en la araba lingvo.

Inaŭgura lekciono

La 13an de oktobro 2010 la IUR denove festis gravan paŝon: la unua „propra” profesoro eldiris sian inaŭguran lekcion pri *Studado pri Korano kaj Hadiso en Okcidento inter orientalisma kaj okcidentalisma sintenoj*. La nova profesoro, d-ro Özcan Hidir, dum la gratulado post la oficialaĵo ricevis de pastoro Gerrit Berveling ekzempleron de *Je la flanko de la profeto*, verko en Esperanto, kiu parte traktas pri hadisoj.

Gerrit BERVELING

LITOVIO

Muzeo plena je humuro

La mondkonata aŭstralia eldonejo de vojaĝgvidlibroj *Lonely Planet* publikigis en sia libro *1000 Ultimate Experiences* (Mil nekutimaj travivaĵoj) liston de LA dek plej bizaraj muzeoj en la mondo. Je kvara rango vicas parko de skulptaĵoj el la sovetia epoko, kiu troviĝas en Grutas apud la urbo Druskininkai en Litovio.

La parko, ankaŭ konata kiel „Mondo de Stalin”, plenas je nigra humuro. La groteska muzeo estas dediĉita al la sovetia okupado de Litovio. Ĝi prezentas ĝardenon de skulptaĵoj de eksaj sovetiaj funkciuloj kaj distran areon Gulago, kiu estas ĉirkaŭigita per elektra barilo kaj kontrolata el lignaj gardoturoj fare de sentineloj. Oni planis kumpeli vizi-


tantojn al brutvagono, tamen la socio kontraŭstaris tiun ideon.

En la parko Grutas okazas diversaj memor-aranĝoj, dum kiuj junpioniroj plenumas glorkantojn pri la laboro. Stalin svingas sian pipon kaj faras tedajn paroladojn, kaj Lenin sidas sur bordo kaj fiŝkaptas.

LAST



En la parko Grutas regas sovetia etoso.



A bundegas biografioj de Zamenhof, ne nur en esperanto, sed ankaŭ en multaj aliaj lingvoj. Tre ĉagrene, ili emas kopii unu el la alia, kaj kiam mankas fakta scio, la aŭtoroj, per sia imago/diveno, inventas faktojn.

Aleksander Korĵenkov tre zorge studis la verajn faktojn kaj ne lasis sin influigi per la mitaro, kiu akumuliĝis pri la iniciatinto de Esperanto.

Ĉu vi povas respondi la ĉi-sekvajn demandojn?

1. Kial strangas la „antaŭnomoj” de Zamenhof: *Ludoviko Lazaro*?
2. Kiu(j)n lingvo(j)n oni kutime parolis, en la familio de Zamenhof?
3. Kiu(j)n profesio(j)n havis la patro de Zamenhof?
4. Ĉu oni prave nomus la patron de Zamenhof *lingvisto*?
5. Ĉu Zamenhof estis polo?
6. Kiun ĉefan celon unue havis Zamenhof por sia kreata lingvo?
7. En la frua vortuzo de Zamenhof mem, kiu estis lia nacio?
8. Kian interrilaton havas la unua formo de „Hilelismo”, poste la „Homaranismo”, ambaŭ de Zamenhof, kaj la „interna ideo” de esperanto?
9. Kial Wilhelm Heinrich Trompeter, en 1894, ĉesis financi la eldonadon de *Esperantisto*, kaj rifuzis plu pagi sa-

Senmita biografio de Zamenhof

lajron al Zamenhof?

10. Kian komunumon projektis fondi Zamenhof en 1914?

Respondoj:

1. La oficiala nomo de Zamenhof estis Lazarj Markoviĉ Zamenhof. „Ludoviko” kaj „Lazaro” estas, respektive, la germana kaj la greka formoj de unusama nomo.

2. La rusan.

3. Instruisto de aritmetiko, la rusa kaj germana lingvoj; cenzuristo de germanlingvaj, hebreaj kaj jidaj eldonaĵoj.

4. Laŭ la nuntempa difino de „lingvisto”, ne.

5. La moderna Pollando estis parto de Rusio, do oficiale li estis ruso.

6. Esti komuna lingvo por hebreoj en fondota hebrea ŝtato.

7. Judismo. La vorto „nacio” en la frua zamenhofa uzado havis alian signifon ol nuntempe. En postaj jaroj li parolis pri sia „gento”, kaj post tio li preferis nomi judismon religio.

8. Hilelismo, laŭ sia formuligo en 1901: purigita hebrea religio, „kreo de neŭtrala popolo”, specife „sekte [kiu] kreas heredon, jam tute formitan kaj historie bazitan grupon, kiu iom post iom solvos en si sian propran popolon kaj poste la tutan homaron. Tia grupo povas esti nur unu, nome la popolo hebrea...”

Reformuligo de Hilelismo en 1906: „instruo, kiu, *ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio*, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia kaj religia principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-homa, sur principoj de reciproka frateco,

egaleco kaj justeco.”

Homaranismo (1917): strebado al „homeco”, al forigo de intergenta malamano kaj maljusteco kaj al tia vivmaniero, kiu iom post iom povus konduki ne teorie, sed praktike al spirita unuiĝo de la homaro ... La Homaranismo estas speciala kaj tute difinita *politika-religia programo*.

Interna ideo de Esperanto (1917): „nedefinita frateca *sento kaj espero*, kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel, kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ilin ...”

9. Ĉar Zamenhof rifuzis aprobi diversajn bazajn ŝanĝojn en la lingvo esperanto.

10. „Kongreso [en 1915] de neŭtrale-homa religio kun la celo starigi novan religian principaron por ĉiuj homoj, kiuj perdis sian gepatran religian kredon, sed ne volas resti ekster ĉiu religia komunumo, kaj fondi tiun komunumon.”

Multegon pli eblas ĉerpi el ĉi tiu libro de Aleksander Korĵenkov, mi elektis nur kelkajn erojn interesajn kaj ofte misprezentatajn.

Kiel mallongan priskribon de Zamenhof, liaj vivo kaj pensaro, mi forte rekomendas ĉi tiun libron. Aliaj verkoj de Aleksander Korĵenkov profunde esploras la internan kaj eksteran mondon de Zamenhof, kaj egale rekomendindas. Sed kiel negranda referenc-libro, ĉi tiu estas vere atentinda.

Donald BROADRIBB

Aleksander Korĵenkov: *Zamenhof. Biografia Skizo* Eld. Sezonoj kun Litova Esperanto-Asocio, 2010. 64 paĝoj vinktitaj. ISBN 978-609-95087-3-3.

Prezo ĉe FEL: 4,70 eŭroj + afranko

Admirinda historilibro

Mi atentigu, ke ĉi tiu libro enhavas du partojn: paĝojn 5-244 en la kataluna lingvo, paĝojn 245-464 en Esperanto. Sama enhavo, reproduktita en du lingvoj. La kataluna lingvo diferencegas de la oficiala „hispana” (kastilia) lingvo tiom, kiom diferencas inter si la kastilia, portugala kaj franca lingvoj.

Maloŝte oni renkontas kompilaĵon de prihistoriaj artikoloj, kiu estas ne nur plena de intereso, sed vere kompetente kompilita kaj redaktita. Kiam temas pri afero tiom konfuza, kiom la kaosplena historio de Esperanto en Katalunio, la leganto multe tro ofte emas formeti la verkon, kun la penso: „Nu, se iam mi bezonos trovi iun tian fakton, eble mi klopodos trovi ĝin en ĉi-libro.” Kaj poste plene forgesas pri la ekzisto de tiu historilibro.

Min do tute surprizis ĉi tiu elegante preparita kaj presita libro, kiu montris al mi, kiom la politiko kaj Esperanto interbatalis dum la pasintaj 120 jaroj. Kaj samtempe devigis min studi la historion de Hispanio kaj Katalunio dum la deknaŭa, dudeka, kaj dudek-unua jarcentoj. Kiu alia lando tiom suferis socian konfuzon, tiom oftan?

La lando Hispanio enhavas grupojn, parolantajn diversajn lingvojn. La oficiala „hispana” lingvo estas la kastilia. Sed, ĉefe en la nord-orienta angulo de Hispanio kaj apuda regioneto de Francio, tute alia lingvo, la kataluna, estas/estas la indiĝena lingvo. La kastilia, la kataluna, la portugala, la franca kaj abundaj aliaj lingvoj – ĉiuj estas latinidaj lingvoj, lingvistike apartaj kaj memstaraj.

En Hispanio, la katalunlingva regiono plurfoje strebis/strebas aŭtonomiĝi, ĉu kiel provinco, ĉu kiel aparta lando.



Nu, do, jen tre mallonga resumo de la problemo, surbaze de tre utila tabelo sur paĝoj 447-457 de la libro:

1892 La unua „moderna” projekto por aŭtonomeco de Katalunio.

1896 La hispana registaro malpermesas telefoni en la kataluna lingvo. En la franca kataluna parto parolado en la kataluna lingvo malpermesita.

1899 La unua konata kataluna esperantisto.

1902 La unua Esperanto-kurso en Katalunio.

1903 La unua Esperanto-bulteno de la katalunaj landoj.

1904 La hispana registaro malhelpas la aljuĝon de la literatura Nobel-premio al la katalunlingva verkisto Àngel Guimerà. Unuaj Esperanto-grupoj en Katalunio.

1905 Okazas Internacia Kongreso de la



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe fel-monato
www.retbutiko.net.

Kataluna Lingvo.

1909 La 5a Universala Kongreso de Esperanto okazas en Barcelono (kataluna urbo).

1910 Kataluna Esperantista Federacio fondita.

1923-1930 La reĝimo de la hispana diktatoro generalo Primo de Rivera (Miguel Primo de Rivera y Orbaneja) malpermesas la uzadon de la kataluna lingvo en lernejoj kaj publikaj aranĝoj. La Kataluna Esperantista Federacio ricevas ordonon aliĝi al la Hispana Esperanto-Asocio.

1930 Falas la registaro de diktatoro Primo de Rivera.

1931 Dua hispana respubliko proklamita. Proklamiĝo de Respubliko Katalunio, kiu, tamen, preskaŭ tuj iĝas aŭtonoma provinco de la Hispana Federacia Respubliko. Katalunaj Esperanto-grupoj ekrajtas funkcii.

1934 La kataluna aŭtonomeco nuligita de la Hispana Respubliko.

1936 Nove elektita hispana registaro restarigas la aŭtonomecon de Katalunio. Armea ribelo komencas internan militon en Hispanio. Franko iom post iom akiras

potencon super Hispanio.

1939 Venkas la armea ribelo. Generalo Franco (Francisco Paulino Hermenegildo Teóduo Franco y Bahamonde Salgado Pardo de Andrade) diktatoriĝas. La aŭtonomeco de Katalunio nuligita kaj publika parolado en la kataluna lingvo malpermesita. La Esperanto-movado malpermesita.

Post la morto de diktatoro Franko en 1975, la Esperanto-movado en Hispanio kaj Katalunio ekfloras. Tamen ankoraŭ nun Katalunio kaj la cetera Hispanio interfermas.

Esperanto

Sufiĉe pri la historia situacio. Nur atentendas, ke la esperantan movadon en Hispanio minacis la fato iĝi ludilo en la manoj de interbatalantaj politikaj grupoj. Laŭ unu vidpunkto, Esperanto estis parto de juda-bolŝevisma-anarkiisma konspiro (kia miksaĵo!) kaj tial abolenda, aŭ almenaŭ zorge regenda fare de la diktatoraj reĝimoj. Laŭ alia vidpunkto, Esperanto estis parto de strebo subteni kaj plivastigi homajn rajtojn, subtenon de sindikatoj, kontraŭŝovinisma, liberi-

ga. Multajn esperantistojn trafis mortigo, parte pro partopreno en la enhispana milito, parte pro sia tro klara protestado.

Nu, en ĉi tiu historilibro ni legas dek kvinon da lokaj historioj, verkitaj de dek kvinon da personoj. Krome, ni legas biografiojn de esperantistaj partoprenintoj en tiu kaosa historio. Ni trovas ne ĝuplenan legaĵon, sed tre zorge verkitajn kaj laŭeble objektivajn raportojn. Nu, diri, ke iu „historia raporto estas objektiva”, estas oksimoro. La historio konsistas el personoj, kaj ĉiu persono samtempe pravas kaj malpravas, laŭ onia vidpunkto. Lojala aŭ perfida? Denove, dependas de onia vidpunkto.

Ensume: vere valora historilibro, modele preparita kaj eldonita.

Donald BROADRIBB

Francesc Poblet i Feijoo kaj Hèctor Alòs i Font (kompilintoj): *Història de l'esperanto als Països Catalans. Recull d'articles/Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro. Artikolkolekto*. Eld. Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio, Sabadell, 2010. 471 paĝoj broŝuritaj. ISBN 978-84-936728-6-7.



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be
Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi, PDF)

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

anoncetoj

Survoje al la UK Kopenhago, de 18-23 julio 2011 la **Hamburga Somero (HoSo)** atendos vin en Germanio. Temo: "Hamburgo - mediprotekta ĉefurbo de Eŭropo 2011". Interrete www.esperanto-hamburg.de/hoso

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa preleaga programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 lhász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2010

1. Trevor Steele: Flugi kun kakatuoj
2. La jaro 2011
3. Alexandre Dumas: La grafo de Monte-Kristo
4. Trevor Steele: Kvazaŭ ĉio dependus de mi
5. Willem Elsschot: Kiel vaglumoj
6. Anna Löwenstein: Morto de artisto
7. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
8. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni
9. Ilustrita oficiala radikaro
10. Lidia Zamenhof: Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj
11. Charles Darwin: La origino de specioj
12. Stefan MacGill: Nemave edifi
13. Katalin Kovacs: Poŝamiko
14. Willy Vandersteen: La brusela bubo
15. Van Damme kaj De Vleminck: Grammaire ABC
16. Jean Codjo: Aventuro en mondo de ŝajnegado
17. Maria Becker: Internacie kuiri
18. Antoine de Saint-Exupéry: La eta princo
19. Ziko van Dijk: Informado praktike
20. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo

La jenaj 20 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2010. Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbutiko.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.